

KONGRESPAROLADOJ DE L.L. ZAMENHOF 1905-1912

(prelego prononcita de Andreas Künzli okaze de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno, Litovio, 29a de julio 2005)

Labormanuskripto – ne por represado. Publikigo nur kun skriba konsento de la aŭtoro.

Enkonduko

- ĝuste antaŭ 100 jaroj okazis la unua internacia kongreso de Eo kaj per tio estis enkondukita la tradicio de la universalaj kongresoj de Eo, en Vilno okazas do la 90a Uk sinsekve.

- kial interesas nin – aŭ devus interesi nin – la kongresparoladoj de LLZ inter 1905 kaj 1912, kvankam ili ja estis faritaj en fora tempo por nia hodiaŭ apenau rekonstruebla au resentebla (krom de kelkaj historiistoj, kiuj profesie kaj sciencece okupiĝas pri tio).

1. La kongresparoladoj de LLZ estas unikaj dokumentoj pri la frua historio de Eo

2. Ili respegulas preskau komplete la tutan pensaron de LLZ ne nur pri la aktualaĵoj de tiu tempo sed ankau pri la esenco de esperantismo, Eo-movado kaj de la Eo-kongresoj.

3. Ili estas belegaj ekzemploj de trafa retoriko de homo, kiu mem estis tre modesta, sed granda idealisto kaj humanisto

4. ili estas belegaj tekstoj verkitaj en modela stilo de nova lingvo, kiu fakte plej malfrue en 1905 komencas esti uzata sur internacia nivelo.

Tial indas, en nia jubilea jaro, dediĉi iom da tempo al la studado kaj analizo de tiuj kongresparoladoj.

Zamenhof prononcis entute 13 kongresparoladojn, inter 1905 kaj 1912.

Al ni certe mankos la tempo trakti kaj analizi ĉiujn tiujn paroladojn, kion oni devus fari en seminario. Mi do limigos min al la pli detala konsidero de la unuaj tri paroladoj: Bulonjo 1905, en kiu estis festita la fakto, ke Esperanto kiel lingvo realiĝis, Ĝenevo 1906, kie Zamenhof volis enkonduki sian homaranismon kaj parolis pri interna ideo, kaj Kembriĝo 1907, kie Zamenhof klarigis la esencon de la Universala Kongreso. Se restas tempo, mi koncize parolos pri la sekvaj kongresoj, kiuj estas ne malpli interesaj el la vidpunkto de la zamenhofaj pensoj kaj eldiroj.

En tiu klopodo mi ŝatus malpli mem interpretadi kaj komenti, sed ĉefe paroligi la fontojn, citante la gravajn pasaĝojn el la paroladoj de Zamenhof, kiuj povas interesi nin ĝis hodiaŭ

En 1903 li skribis al Sejnaeve (nomo ne aperianta nek en EdE nek en EeP) tamen sufiĉe gravan leteron – temas pri principoj kiel organizi universalan kongreson.

„Vian ideon pri la aranĝo de internacia kongreso de esperantistoj mi trovas tute bona. Sed por ke la kongreso donu al nia afero ne malutilon, sed nur utilon, ĝi devas esti aranĝita laŭ la sekvantaj principoj:

- ĝi devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi karakteron de granda, solena kaj imponanta festo de internacia frateco, por ke la gazetoj multe parolu pri ĝi kaj ke ĝi estu plena de entuziasmo...“

- En la kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, ktp.

Bulonjo 1905: SANKTA MISTERO

Unua Kongreso Esperantista: Boulogne 1905 (5a ĝis 13a de aŭgusto 1905)

Antaŭ sepcento da homoj LLZ diris:

„Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiun ĉiujn nin ligas.“

„Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo.“

„Ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas paflegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas.“

„Sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, aŭ aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la somoj de iu granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo al estona, de tempo tuta nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.“

LLZ tuj kaptas la okazon kritiki la miljaran malamon kaj bataladon inter la gentoj:

„Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, – tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al la aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute ne ebla.“

Kaj li dume konkludis:

„Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi“.

„En nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas. Ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj. Ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio. Kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu al la alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu la alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo.... En Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj.“ Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos.“ „Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Marco fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro...“ „Gravegaj estos la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Marco, kaj ili estu benataj!“

Do, tio sonas kvazaŭ kiel diserva liturgio, sed oni devas imagi la emociojn, kiuj trafis Zamenhof, kiam li konstatis, ke plurcentoj da homoj el diversaj landoj kunvenis en Esperanto-kongreso por paroli inter si tiun lingvon, kvankam en multaj kazoj ankoraŭ balbutante, sed tamen kun konvinko kaj entuziasmo.“

Post tiuj ardaĵ vortoj, Zamenhof menciis kelkajn meritoplenajn pionirojn de Esperanto, kiuj faris esencan kontribuon al la disvastigo de la planlingva ideo kaj de Esperanto – temas pri sinjoroj Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük, la germanoj Leopold Einstein kaj Wilhelm Heinrich Trompeter kaj la polo Jozefo Waśniewski, kiujn li nomas „batalantoj de nia afero“.

Iom surpriza ŝajnas la sufiĉe longa omaĝo al Schleyer, la aŭtoro de Volapük. Kiam Zamenhof eksciis pri Volapük, li estis iom ŝokita pro la ekzisto de konkurento. En la gazeto "La Esperantisto" (1889/90), Zamenhof akre kritikis la ŝlejeran idiomon, kaj la sorto volis, ke la du viroj ankaŭ neniam renkontiĝis, iliaj mondoj estis tro diversaj unu de la alia.

Nun en Bulonjo Zamenhof laŭdas sinjoron Schleyer kiel “unua, kiu per senlaca laborado verkis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala”. Zamenhof ja restis ĉe sia kritiko pri Volapük, kies “lingva formo... montriĝis ne bona” kaj “la afero, por kiu li batalis...alportis grandan malutilon al nia ideo entute”. Sed Zamenhof konfesis, ke “ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj.” Schleyer denove estis memorata de Zamenhof en siaj festparoladoj en Dresdeno en 1908 kaj en Antverpeno en 1911. En Antverpeno li nomis Schleyer “la vera patro de la tuta internacilingva movado”.

Tial, Zamenhof estis konvinkita, ke “la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos.

Sian kortuŝan alparoladon la “homo” (ne naciانو) Zamenhof finis per poemo, kiun li nomis preĝo: Koncerne al la preĝo, la francaj estroj volis malpermesi tiun konkludon al la zamenhofs parolado. Precipe li ricevis la ordonon ne legi la lastan strofon. Do li konkludis sian paroladon per la lautlego de sia preĝo sen la lasta strofo, kiun samkongrese ĉiuj havis la okazon legi. Tiu ĉi malpermeso vipis la intereson de la publiko al la preĝo mem kaj vekis la simpatian al Zamenhof kaj al lia kuraĝo.

La lasta strofo de la Preĝo sub la verda standardo havis jenan enhavon:

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj.
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

En la tiama tempo, precipe en orienta Eŭropo la „ŝovinismoj lingvo-religiaj batalminacis homan vivon, ne nur inter landoj, sed en la regnoj mem pro miksitaj loĝantaro“, dum „al Okcidentanoj, antaŭ mondilito“ tiuj problemoj „ne tiel klare aperis“ (E. Privat, Vivo de Zamenhof).

En tiu tempo frazoj kiel

Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.

en la preĝo sub la verda standardo estis absolute ne eblaj en Francio. La frazoj kontraŭis la principojnde kristanismo, kaj oni ne forgesu ankaŭ la antisemitismon, kiu regis en tiu tempo. Hodiaŭ ne plu estas problemoj publike diri tion. Multaj homoj eĉ ne plu interesiĝas pri tiaj diroj, ĉar ili ŝajnas al ili memkompreneblaj kaj tute ne sensaciaj.

Cetere, en decembro 1904 LLZ skribis al Michaux pri sia himno: „ho ve! Ĝi tute malprospetis al mi ! Anstataŭ esprimi tion, kion mi volis, la himno sub mia plumo ricevis formon tre mallertan kaj trivialan kaj tial mi decidis *ne* publikigi ĝin.“ Kaj en januaro 1905 li skribis al Michaux: „Mi volis esprimi en tiu preĝo tiun naturan religion de la homa koro, kiu estas egala en la koroj de ĉiuj homoj... .. sed bedaŭrinde mi tute malsukcesis, kaj mia versaĵo ricevis formon tute sengustan kaj sentaŭgan.“

Zamenhof atendis de la bulonja kongreso de multe, kiel li mem skribis al Bourlet en januaro 1905. Inter alie li esperis, ke la kongreso donos al la esperantistoj komunan organizaĵon. Nu, la bazo por la Lingva Komitato ja estis enkondukita, dum por la movada organizado oni ne sukcesis kaj devis ankoraŭ atendi kelkajn jarojn. La projekto de Zamenhof pri Tutmonda Ligo Esperantista ne estis realigita. Zamenhof bone konsciis, kio povas okazi, se la movado ne havas komunan organizon kaj dependas de unusola homo. Li povas ekemple morti pro akcidento aŭ ruinigi la movadon kiel Schleyer, aŭtoro de Volapük faris.

Deklaracio pri Esperantismo

Necesas aldoni kelkajn vortojn pri la tiel nomata Deklaracio de Esperantismo, dokumento kiu estis proklamita kiel oficiala teksto de la bulonja kongreso kaj kiu formis la bazon por la esperantista identeco kaj por eviti miskomprenojn rilate la intencojn kaj celojn de la lingvo Esperanto.

„La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu 'ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn', donus al la homoj de malsamaj nacioj, la eblon kompreniĝadi inter si,“ ktp.

„Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Eesperantismo ne respondas.“

En la deklario estis fiksita, ke la lingvo Esperanto estas „nenies propraĵo“, nek en rilato materiala nek en rilato morala. Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo...“

„Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj aparta homo.“

La bazo de la lingvo Esperanto estas la „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniuj havas la rajton fari ŝanĝon.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ĝia aktiva societo esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga“.

Do, per tiu deklaro oni volis eviti kelkajn miskomprenojn kaj danĝerojn, kiuj povus minaci Esperanton: unue distingi la lingvon de ĝia ideologia fono, due eviti la danĝeron, ke Esperanto povus fiaski kiel en la kazo de Volapük, kie unusola homo decidis la aferojn, kaj trie averti pri la danĝero komenci reformdiskutojn pri la lingvo Esperanto, kiel ili okazis en la jaroj 1893/94, kiuj fakte kondukis al nenio utila.

Malgraŭ kelkaj incidentoj kiel la malpermeso de lego de la lasta strofo de la preĝo au la neapero de Louis de Beufort, kiu vidis en Esperanto nur lingvon, Zamenhof sendube trankvile kaj ĝoje reveturis Varsovion, ĉar en la bulonja kongreso li vidis, ke Esperanto realiĝis kaj sukcesis.

Malgraŭ ke movada organizo ne povis esti starigita, kiel LLZ konfirmis al Michaux fine de aŭgusto, LLZ bone revenis Varsovion kaj montris sin dankema kaj feliĉa pro la „bonega aranĝo de la kongreso, kiu havis grandegan kaj brilantan sukceson kaj restos longe en la memoro kaj en la koro de ĉiuj partoprenantoj.“

La jaro 1905 estis, ĉefe por Ruslando, aparte malfeliĉa jaro: En la sanga dimanĉo en januaro en Sankt Peterburgo estis mortpafitaj almenaŭ 1000 manifestanciantoj, la milito inter Ruslando kaj Japanio signifis kompletan katastrofon por La Cara Imperio, kies registaro perdis ĉian kredindecon. Eĉ la proklamo de civitanaj rajtoj reage al la popol-revolucio ne plu povis savi ĝin. Ankaŭ Zamenhof ricevis la ordonon iri al la milito, kaj li devintus forveturi al Manĝurio. Sed li estis liberigita, ĉar lia malbona sano ne permesis militoservon.

La malfavoran situacion en sia lando Zamenhof mem priskribis en letero al Javal en novembro 1905 per jenaj vortoj: „La vivo en nia lando kaj precipe en nia urbo estas nun efektive terura malbona, ni ĉiuj estas tre ekscititaj, la tuta tago estas plena de zorgoj kaj mi estas nun tute nekapabla iom fari.“ En Varsovio regis la milita stato.

Ĝenevo 1906: HOMARANISMO KAJ INTERNA IDEO

Dua Kongreso Esperantista: Ĝenevo 1906 (27a de aŭgusto ĝis 5a de septembro 1906)

Ĝenevon LLZ taksis kiel tre taŭgan lokon, ĉar ĝi situas en neŭtrala lando, kaj LLZ plentuziasmo ekpreparis sin por tiu kongreso, sed badlaŭ aperis malhela lumo sur la ĉielo.

Por komplete kompreni la duan kongreson esperantistan necesus ĉi tie nun analizi la tiel nomatajn dogmojn de hillelismo aŭ homaranismo aŭ la deklaron de hilelisto aŭ homarano. Tiu temo formus apartan prelegon, kiu nun ne estas antaŭvidita.

Tamen, eblas resume diri jenon.

Por Zamenhof Esperanto kaj esperantismo ne estis unuavica celo, sed rimedo al la granda celo: al homaranismo. Homaranismon LLZ difinis kiel “celadon al pura homeco kaj la absoluta intergenta justeco kaj realeco”. Kun ĉi-koncernaj ideoj la kreinto de Esperanto publike elpaŝis en 1906 unuafoje en la gazeto “Ruslanda Esperantisto“. Sub la titolo “hillelismo” Zamenhof prezentis teorion, kiu formis la kulminon de siaj idealismaj imagoj. Ĝi enhavas fortan religi-socian akcenton kaj en sia kerno estas serĉenda en la talmudo kaj en la judeco de Zamenhof. La hillelismo, poste nomata homaranismo, povas esti tiel karakterizita, ke Zamenhof celis krei “neŭtralan” socion aŭ homaron, surbaze de “neŭtrale-homa” religio, “neŭtrale-homa” etiko kaj “neŭtrale-homa” lingvo, jen la tri iloj, la tri pilieroj por la fina rezulto. Zamenhof difinis la homaranismon kiel la strebadon al absoluta justeco kaj egaleco inter la popoloj kaj religioj. La enhavon de tiu vizio, kiu iom post iom emancipiĝis de la judismo en la direkton de universala percepto, Zamenhof resumis sub pseŭdonimo en sia 'deklaracio de hilelismo' (ĝi aperis en 1901 en la gazeto Ruslanda Esperanto kaj en 1906 en aparta broŝuro). Tiun tutan flanko de la zamenhofa pensmaniero la esperantologo Gaston Waringhien apostrofis kiel “ideologian dramon” de LLZ.

Cetere, kiel LLZ skribis al Javal en majo 1906, « la plej akraj malamikoj de la homaranismo estas la esperantistoj Varsoviaj. »

En 1906, Zamenhof volis prezenti sian hilelisman-homaranismon al la partoprenantoj de la 2a mondkongreso de la esperantistoj en Ĝenevo. Sed ho ve! – oni baris al li tiun intencon. Tuj aperis kelkaj akraj kritikantoj, kiuj komplete rifuzis la teorion de Zamenhof. Katolikoj malkovris novan kaj nedezirindan savinstruon konkurencon al la kristanismo, ateistoj kritikis ĝian same nedezirindan religian karakteron, iuj francaj esperantistoj evidente havis problemon akcepti la mistikaĵon el Rusujo. La eminenta litova katolika pastro Aleksandras Dambrauskas el Kaunas rifuzis la hilelisman kiel senutilan ideologion, argumentante, ke ĝiaj bazaj ideoj estis pli taŭge formulitaj de Jesuo Kristo, de la evangelio, poste de la humanistoj, framasonoj kaj aliaj. Dambrauskas interpretis la hilelisman kvazaŭ kiel ofendon kontraŭ kristanismo kaj riproĉis al LLZ, ke li aŭdacis meti Hillelon sur sama pozicio kiel Jesuo Kristo respektive intenci superi lin al Jesuo Kristo.

Kiel oni vidas, la publikigo de la hilelismo-homaranismo rikoltis akrajn reagojn de diversaj flankoj,. Emile Javal, eminenta franca esperantisto, kompreninte la tiklan situacion, kiun Zamenhof kaŭzis kun sia instruo, eĉ konsilis al Zamenhof eĉ ne veturi Ĝenevon por eviti publike paroli pri la homaranismo kaj tiel eviti eventualan skandalon. Ĉi tiu konduto de Javal kaŭzis ĉe Zamenhof konfizon kaj ĉagrenon. La aŭtoro de Esperanto reagis ofendite kaj efektive dubis ĉu li entute alvenu en la 2a kongreso. Sed ekhavinte malbonan konsciencan, kaj post kiam li trankviliĝis, Zamenhof kompreneble tamen decidis veturi Ĝenevon. En sia kongresa parolado li ne parolis pri homaranismo rekte, sed pri siaj imagoj pri la interna ideo de Esperanto. Tute certe, ĉi tiu elstara parolado de Zamenhof estis unu el la plej trafaj kaj impresaj iam ajn faritaj en Esperanto, eĉ se la verkinto devis rezigni pri la laŭtleĝo de la dogmoj de la homaranismo.

Koncerne la miskompreneco de la nocio dogmo necesas klarigi jenon: La esperantologo Claude Gacond atentigis, ke en la franca (kaj cetere ankaŭ en la germana) pensmaniero la vorto "dogmo" estas termino rezervita al la religia vivo. En filozofio estas pli

uzata la terminon "principo". Zamenhof ne faris tiun ĉi distingon. Li utiligis la grekdevenan vorton „dogmo“, kiun li prave opiniis pli internacia, ol la latindevena "principo". Se oni trastudas lian penson konsciante pri tio, kaj komprenas, ke lia termino "religio" devas esti konsiderata kiel "etiko", oni malkovras la revoluciecon de lia penso, kiu restis revolucia ghis hodiaŭ. Certe, la ĉefa problemo rilate al Zamenhof estis ne lia judeco mem, sed lia konduto kiel judo (orienta judo) el eksterfrancio.

Por klarigi kial li kreis la homaranismon, Zamenhof devis unue klarigi la situacion en sia patrujo, kiu estis karakterizita de gentaj persekutoj kaj pogromoj, precipe kontraŭ judoj:

“Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por liberemo, por la plej elementa homa liberemo, por la *rajtoj de homo*. ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la *gentoj*. Sed krom la batalado pure politika, en la dirita lando estas nun faranta io, kio nin kiel Esperantistojn ne povas ne tuŝi; Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado *intergenta*. Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis iam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos.

Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon:

en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj.

Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj majunuloj kaj senhelpaj infanoj!

Kaj Zamenhof postulis:

Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon, libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj!

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam.

Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la Esperantismo. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize. Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la deklaro, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean.

Kaj reage al la bulonja Deklaracio de Esperantismo, en la sama parolado Zamenhof rifuzis, ke pri Esperanto oni parolu nur pri lingvo kaj evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun la *ideo*.

Kaj li diris kun firma voĉo:

“Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas *ĉiuj* elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto!

“Ho, ne, ne neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon.

“Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: “Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj proktika utileco, ni volas havi nenion komunan” !

Pala staris Zamenhof en la ĝeneva Viktoria-Hall eldirante tiujn frazojn per laŭta kaj decida voĉo, kiel raportis Edmond Privat en sia biografio Vivo de Zamenhof. Tremiga aplaŭdego montris al li, ke la plejmulto lin komprenis kaj aprobis el la tuta koro. Fakte estis nur kelkaj malmultaj homoj kiel Louis de Beaufront, kiuj diris, ke Esperanto estas nur lingvo – tial li poste transiros al Ido. Lia kulpigo kontraŭ la “interna ideo” profunde vundis la koron de Zamenhof.

Plue:

“Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas.

“Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*.

“Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la unua tempo.

“Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano;

“Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉiu parolis pri ĝi, kaj sindone laboris.

Kaj li demandis sin publike:

“Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto “nur lingvon?”

Kaj Zamenhof rememorigis la publikon, kiun la partoprenantoj de la bulonja kongreso sentis:

“vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna *ideo* de la Esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro.

“Ni sentis, ke komenciĝis la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco.

« Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanton aŭ laboras por ĝi, estas Esperantisto, kaj ĉiu Esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan.”

“*Tiaj* Esperantistoj kredeble ne venos al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj, praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademijaj, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo, kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana.”

“Sed tiuj Esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia *koro*, kiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan *ideon*; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistoj, kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj.”

Kaj li finis la paroladon per la frazoj:

“Ĉiu nia nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la Esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de la homa frateco.”

Oni povas diri, ke la tiamaj kaj postaj generacioj de esperantistoj nek komprenis, nek pretis adopti la jes iom abstraktan ideon de 'neŭtrala' etiko aŭ de 'neŭtrala' religio. Aliflanke restis vivanta la baza penso de la hilelismo resp. homaranismo, nome tiu de la amikeco, frateco kaj justeco inter la popoloj kaj homoj de diversaj devenoj. Ĝin oni nomas la 'internan ideon' de la neŭtrala lingvo Esperanto. La esprimon uzis Zamenhof en sia ĝeneva parolado kiel sinonimon por la homaranismo, kaj eble estis pli bone tiel. En 1901 LLZ skribis al Kofman, ke “mi konvinkiĝis, ke hilelismo sen la lingvo neniel povus ekzisti, ĝi havus nenan sencon kaj prezentus nur falsan, nevivipovan kompromison.... Ne tiimu tamen, ke la projekt de hilelismo kun lingvo neŭtrala estos danĝera por Esperanto! Ho ne, ho ne !... ambaŭ demandoj estas tre malvaste kaj nedisigeble ligitaj inter si. Tiel same kiel la hilelismo ne povos ekzisti sen lingvo neŭtrala, tiel same la ideo de lingvo neŭtrala neniam povos vere efektiviĝi sen hilelismo!

Post kiam Zamenhof fiaskis kun sia homaranismo, kiun li volis oficialigi en Ĝenevo, ĉe la esperantistoj jam en 1906, ĉi tiuj adoptis sole la “neŭtralan” lingvon, kiun ili propagandas ĝis nun. Tamen, kelkaj esencaj ideoj de la homaranismo pluekzistas en la tiel nomata “interna ideo” de la esperantismo”, pri kiu la esperantistaro tiom fieras kaj kiu tiom diferencas ilin de aliaj planlingvaj kaj etnolingvaj parolkomunumoj.

Multaj esperantistoj estas konvinkitaj, ke ĝuste tiu interna ideo kiel kosmopolita-humanisma etiko estas, apud la genia gramatika konstruado de la lingvo, respondeca por ke Esperanto pluvivis, ĉar ĝuste en tiuj du punktoj Esperanto distingiĝas de aliaj planlingvoj, kiuj estas pli lingvistike ol sociideologie orientitaj.

En Ĝenevo, kie ĉeestis 1200 esperantistoj, LLZ evidente ricevis la pruvon, ke la e-istoj vidas en Esperanto ne nur la lingvon. Privat skribis: “Laŭ la sento de l'kongresanoj Zamenhof komprenis tre bone Ke la interna ideo gajnis la korojn. “ Do, li sukcesis sian malfacilan ideologian ekzamenon kaj pli trankvila reveturis Varsovion. Por prepari sian venontan paroladon en Kembriĝo, kie okazis la kongreso en 1907. Kiel Privat skribis: “La kongresoj estis por li plej lumaj horoj en la tuta jaro”, kiu mem estis “longa kaj malhela”. Li bone pripensis, kion li volas diri venontjare kaj serioze preparis sian paroladon. Tial, la kongresparoladoj apartenas al la kulminoj en la verkaro de LLZ, apud liaj gazetartikoloj, kiuj estas longa fajro de brila retoriko. Kaj se LLZ opiniis, ke li havas nenion por diri, li ne hezitis konfesi tion, kiel ni ankoraŭ vidos poste.

Kembriĝo 1907: PRI LA ESENCO DE LA ESPERANTISTAJ KONGRESOJ Tria Kongreso Esperantista: Cambridge 1907 (12a ĝis 17a de aŭgusto 1907)

En Kembriĝo oni festis samtempe la 20an jubileon de la publikigo de la Unua Libro de Esperanto en 1887. „Nun nia afero staras forte“, diris LLZ. „La glacia tavolo de antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita.“

En la kembriĝa UK, kiun partoprenis 1300 personoj, LLZ utiligis ankaŭ la okazon paroli pri la esenco kaj la celo de la Eo-kongresoj. Kaj li starigis la jenajn demandojn:

„Por kio ni do kunvenas? Ĉu ni kunvenas por paroli pri Esperantaj lingvaj demandoj? Ne! Tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la kongreso, sed ekskluzive al la Lingva Komitato, kaj por ili sufiĉus kongreso de komitatanoj.

„Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en Esperanta parolado? Por tio sola ni ne bezonas veturi al kongreso, ĉar en niaj hejmaj grupoj ni povas en la daŭro de la tuta jaro multe pli ekzerciĝi, ol en la kelkaj tagoj de la kongreso, kaj por la sola kelktaga ekzerciĝo en parolado neniu entreprenus vojaĝojn.

“Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon? Jes, certe! -... Ni faras manifestacion kaj propagandon por la Esperantismo ne pri ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la Esperantismo havas por la tuta *homaro*, por tiu komunehoma celo, kiu nin, aktivajn Esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la Eesperantismo en si enhavas... por vigligi en ni la amon al la ideo Esperantisma. Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.“

Kaj LLZ revenis al siaj klarigoj pri interna ideo, kiujn li jam prezentis la antaŭan jaron en Ĝenevo: „En Esperantujo regas ne sole la *lingvo* Esperanto, sed ankaŭ la interna *ideo* de la Esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala Esperantismo, - tie regas ankaŭ iu alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita, sed tre bone sentata de ĉiuj Esperantujanoj – tie regas la *verda standardo!* (oni atentu la terminologion)

Kaj li difinis la verdan standardon:

„Ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj

Sur neŭtrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian

Kaj, revene al la originaj ideoj pri homaranismo, LLZ ripetis:

„Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn“. Alivorte: „Ni ne deziras nin enmiksi en la *internan* vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei *ligantan* ponton inter la gentoj“

Tio kondukis LLZ-n al la emfazo de la graveco de la neŭtraleco de la kongreso.

„Jes, neŭtraleco estas la ĉefa principo de niaj kongresoj; sed oni devas ĝuste kompreni la sencon de tiu ĉi neŭtraleco. Neŭtraleco ekzistas en ĉiuj internaciaj kongresoj; sed dum tie la neŭtraleco estas simple afero de takto, ĉe ni ĝi estas la ĉefa principo, ĉe ni la neŭtraleco, aŭ pli ĝuste la neŭtraligo de la intergentaj rilatoj estas la tuta enhavo, la tuta celo de niaj laboroj.

Tial, ni neniam devas paroli en niaj kongresoj pri aferoj speciale politikaj, kiuj apartenas al la diplomatoj, aŭ pri aferoj speciale religiaj, kiuj apartenas al la ekleziuloj kaj filozofoj – ĉar la verda standardo malpermesas al ni fari ion, kio povus ofendi tiun aŭ alian genton aŭ religian grupon.“

Sed „ĉio, kio kondukas al rompado de la muroj inter la gentoj, apartenas al nia kongreso.“ „Ĉar ĉio, kio servas al la fratigado de la gentoj kaj al la rompado de la malamikaj muroj inter la popoloj – se ĝi nur ne enmiksas sin en la internan vivon de la gentoj – apartenas al la verda standardo.“

Fine, LLZ rimarkigis, ke ĉio kion li diris, estas lia privata opinio, kiun „mi tute ne volas proponi al vi kiel ian oficialan programon por niaj kongresoj.“

Per tiu rimarko LLZ elegante eskapis eventualajn novajn kritikojn flanke de francaj aŭ aliandaj esperantistoj, inter kiuj estis kelkaj, kiuj ege malŝatis la homaranismajn ideojn de LLZ.

Kaj la optimisto kaj idealisto LLZ finis sian kembriĝan paroladon per la vortoj:

„Kaj ju pli ni partoprenados en niaj ĉiujaraj kongresoj, des pli ni interfratiĝos kaj des pli la principoj de la verda standardo penetros en nian animon.

„Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj.“

Tre interesa estas ankaŭ lia alparolado en la urbodomo Guildhall de Londono la 21an de aŭgusto 1907, kie li tuŝis kelkajn tre interesajn temojn:

- denove la temon pri la difino de la esperantismo
- la temon de patriotismo (li rifuzis la kulpigon,, ke esperantistoj estus malbonaj patriotoj)
- la temon de la organizaj strukturoj de la Eo-movado.
- la ateston, ke Litovujo estas lia natura patrujo

La esencon de esperantismo li konfirmis per la jenaj vortoj:

„Le Esperantismo celas la reciprokan sinkomprenadon kaj konsekvence ankaŭ estimon kaj amon inter ĉiuj gentoj kaj nacioj.“

Kiel Edmond Privat raportis, la kembriĝa kongreso estis brila kaj plensukcesa. Zamenhof admiris la komercon de britaj idealistoj kaj verŝajne estis eĉ surprizita, ke en lando de angla lingvo, Esperanto trovis tiom varman akcepton kaj sinceran apogon. En sia parolado LLZ laŭdis, ke „La Kembriĝanoj akceptas nin hodiaŭ ne kiel komercistojn, kiuj alportas al ili profiton, sed kiel apostolojn de ideo homarana, kiun ili komprenas kaj ŝatas.“ Tre bela laŭdo, pri kiu eĉ aludis la urbestro kaj aliaj eminentuloj de la universitato.

Koncerne la mondan lingvon, LLZ skribis en The Independent en 1904 la jenon: „Kial jam ekzistanta lingvo, kiel angla, ne estu elektita kiel internacia perilo?“

Kaj li donas la principan kaj standardan respondon: „Neniam estus eble elekti por internaciaj uzoj iun ajn naturan lingvon. La memestimo kaj sinkonservaj instinktoj de ĉiuj popoloj neniam eprmesus tion. La popolo, kies lingvo estis elektita, gajnus vere grandan superforton super la ceteraj kaj baldaŭ subigus ĉiujn aliajn popolojn. Se eĉ se ni konsentus, ke ĉiuj popoloj volus je propra iniciato elekti tian ekzistantan lingvon, neniu estus la gajninto, ĉar ĉiuj naturaj lingvoj estas tiel terure malfacilaj, ke ilin funde ellerni povus nur tiuj, kiuj posedas grandan kvanton da libera tempo kaj grandajn nomajn rimedojn.“

Tiutempe, kiel la orienta parto de Pollando, ankaŭ Vilno, Kovno kaj Grodno estis partoj de la Ruslanda Imperio. Nur en 1918 Litovio fariĝis sendependa ŝtato.

Estas ĉi tie interese menci, ke LLZ konsideris Litovujon kiel sian naturan patrujon: En aŭgusto 1907 li diris en la londona Guildhall: „Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun neniam alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sicnere amas).“

Iam dum 1906, verŝajne en junio, LLZ skribis al Tabenski de la Vilna Grupo Esperantista salutleteron kaj skribis i.a.: „Kvankam nun tempo estas tre malfavora por nia agado, mi tamen estas konvinkita, ke post kelka tempo Via societo ludos grandegan rolon en nia afero, ĉar eble neniam lando tiel forte bezonas internacian fratecon, kiel Litovujo.“

ORGANIZAJ DEMANDOJ

Dresdeno 1908: Kvara Kongreso Esperantista: Dresdeno 1908 (17a ĝis 22a de aŭgusto 1908)

Unua kun registara protekto kaj kun 1500 partoprenantoj.

Por kompreni la kongresparoladon de Zamenhof en Dresdeno necesus iom studi la organizan situacion de la Eo-movado ĝis la jaro 1908. Jam fine de la 19a jarcento LLZ sugestis la fondon de „Tutmonda Organizo Esperantista“. En 1905 estis fondita Lingva Komitato kaj Centra Oficejo en Parizo. En 1900 estis kreita Delegacio por la Alpreno de Lingvo Internacia, kiu kondukis al la Ido-skismo. Kaj en 1908 Hector Hodler starigis en Ĝenevo Universalan Eo-Asocion. En la 20aj jaroj la movada organizastrukturo fariĝis ankoraŭ pli komplika.

En sia dresdena alparolado Zamenhof konvene reagis al tiu pasinta movada kaoso. Spite al la Ido-skismo, kiu skuis la Eo-movadon en la jaroj 1907/8, kaj certe ne sen la ĝojo pri la fondo de UEA, Zamenhof aperis en Dresdeno kun granda memfido kaj trankvilo, dirante en sia festparolado i.a. jenajn frazojn:

„Nun ni atingis tian potencon, pri kiu multaj el ni antaŭ dek jaroj ne kuraĝis eĉ revii, kaj se ni marŝos en tia sama harmonio kiel ĝis nun, nenia forto en la mondo povos haltigi nian iradon, kaj ni plene atingos nian celon.“

Al la iamaj oligarkoj kaj al la skismemuloj, kiuj forlasis la vojon de Esperanto kaj kreis anarkion movadan, Zamenhof donis decidan rifuzon, sen menciigi nomojn, ĉar finfine li certe estis dankema al ĉiuj, kiuj iel kontribuis al la firmigo de la Eo-movado, eĉ se ili iris sian propran vojon. Nia prezidanto Renato Corsetti dirus hodiaŭ: Ĉiu el ni faras ion utilan. Tamen, Zamenhof estis ankaŭ seniluziigita pri tiuj, kiuj forlasis lian linion.

Ĵuĝante laŭ lia parolado, vere Zamenhof faris en Dresdeno trankviligitan esprimon, ĉar laŭ li la movada kaoso finiĝis kaj la organizaj problemoj solviĝis, kaj li diris:

„Kaj nun ni ĉion forgesu; ni komencu la grandan feston, por kiu ni ĉiuj kunvenis el la diversaj landoj de la mondo; ni ĝoje pasigu nian grandan ĉiujaran semajnon de la pure homara festo... Ni memoru pri tio, ke niaj kongresoj estas ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro“

Do, spuroj de la zamenhofa homaranismo konstante revenas.

Barcelono 1909: DEZIRO FORIRI

Kvina Kongreso Esperantista: Barcelono 1909 (05a ĝis 11a de septembro 1909)

Jam aperis ĉe LLZ la deziro fordoni sian gvidan rolon, ĉar la infano Esperanto fariĝis adoleska kaj memstara. LLZ eĉ konsideris, ke lia vojaĝo al Barcelono ne estas necesa, al Bourlet li skribis, ke li ne estas konvinkita pri tio.

„Forte, tre forte mi dezirus forrifuzi mian por mi tro turmentan rolon, kaj stari ne antaŭ vi, sed inter vi.“

Fakte LLZ opiniis, ke li malutilas al la movado, se li daŭre staras en la centro de la majstrokulto. Li vidis sin nur kiel „simbolon de via afero kaj de vi unueco, kiel via konkreta reprezentanto“

Fone de tiu konvinko, Zamenhof havis la impreson, ke en Barcelono li „havas nenion gravan por diri“, tial li parolis mallonge. Li pensis jam, ke la movado marŝas sen li kaj kreskas bone sen liaj komentoj kaj konsiloj kaj anstataŭ tio ege laŭdis la „eksterordinare honoran kaj simpatiplenan akcepton“ fare de la urbo Barcelono.

Vaŝingtono 1910: RIFUZO DE LA KRITIKO DE ESPERANTO

Sesa Kongreso Esperantista: Vaŝingtono 1910 (14a ĝis 20a de aŭgusto 1910)

Ankoraŭ en februaro Zamenhof forte dubis, ĉu havas sencon organizi la venontan kongreson en Usono kaj ĉu entute eblas konfidi al la Nord-Amerika Asocio tiun kongreson. Al Sebert li skribis: „Tamen ŝajnas al mi, ke revoki la Vaŝingtonan kongreson ni ne povas, ĉar tio donus skandalon. Mi opinias, ke ni devas fari bonn mienon al la malbona ludo kaj ne perdi al la esperantistoj la esperon de bona sukceso. Tre povas esti, ke malgraŭ la malfavoraj cikronstancoj la kongreso tamen sukcesos.“

Zamenhof ne veturis al Usono por turismi aŭ komercadi, kiel li diris en sia festparolado, sed „por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri la nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj.“

Fakte en Usono li sentis sin en sia spirita patrujo, ĉar ĝuste tiu lando unuigas plej diversajn gentojn, ĝuste tiu lando disblovas „liberan, de neniun monopoligitan aeron.“

Kaj en la senco de homaranismo, kiu neniam forlasis lin, li aldonis: „Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. „

„Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono...“

Koncerne la interrilatadon inter gentoj kaj Lingvo Internacia, LZZ skribos en grava samnoma artikolo en la sama jaro 1910: „La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos en la homaro nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion; ĉar tiam la tuta homaro en efektiveco prezentos nur unu genton.“

Krom klarigi en kio konsistas la esenco de la esperantismo, en sia vaŝingtona parolado li tro longe paroladis pri la problemoj de la ŝanĝoj en la lingva Esperanto kaj la kritikoj pri la lingvo Esperanto. Ĉu tiu temo en tiu okazo estis tiom feliĉa kaj ĉu ĝi aparte interesis la usonanojn oni vere povas dubi.

Sed fine li ankoraŭ resumis kelkajn principojn de Esperanto kaj i.a. asertis, ke „Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto“. Ŝajnas al mi, ke li diris tion pli el vidpunkto, ke Esperanto venkis inter la planlingvoj ol ke li volis kvazaŭ atakti la anglan lingvon kiel fariĝontan internacian lingvon, kiel li iomete aludis en Kembriĝo. Resume oni povas diri, ke en Vaŝingtono LLZ rifuzis definitive la kritikon de tiuj, kiuj volis fari ŝanĝojn en la lingvo Esperanto kaj defendis la vojon, kiun li nun elektis. Supozeble tio plaĉis al la usonanoj, ĉar ankaŭ ili ŝatas la principojn klarajn kaj ne sanceliĝantajn.

En la sama jaro 1910, UEA organizis sian unuan memstaran kongreson en Augsburg, Germanio. Kaj en majo Zamenhof faris ankaŭ paroladon ĉe la solena malfermo de la Unua ruslanda Kongreso en SPB.

En sia ferma parolado LZZ diris: „Kiam mi decidis veni al Ameriko, mi konfesas, ke mi komencis mian vojaĝon kun iom da dubo. Ŝajnis al mi, ke Usono estas ankoraŭ tro juna en nia movado por fari Kongreson. Oni devis tamen subteni niajn usonajn amikojn, kaj kiam mi venis, mi vidis kun ĝojo, ke miaj duboj estis vanaj. La Sesa estis sama kiel la aliaj Kongresoj, kaj restos en nia memoro same.“ Partoprenis ĝin nur 357 personoj.

En Eŭropo Prusio akcelis la militarismen, Polen anoncis sian volon fariĝi ŝtate sendependa, la eŭropaj politikistoj emfazis sian intencon al paco.

Antwerpen 1911: KADUKA HOMO, KIU DEZIRAS PACON

Sepa Kongreso Esperantista: Antwerpen 1911 (20a ĝis 27a de aŭgusto 1911)

En Antverpeno Zamenhof aperis jam kiel kaduka homomalsanema. Fakte la kuracisto malpermesis al li fumadi kaj konsilis al li ripozon kaj trankvilecon. „Al Sebert li skribis en aŭgusto 1911; „Bedaŭrinde mi nun ne povas tion plenumi..., mi efektive dum du monatoj ne fumis; sed nun pro la ekscitanta prepariĝo al la kongreso mi devis denove komenci la fumadon...“

Li anoncis en sia tuta mallonga parolado, ke lia sano estas tro malbona, li unue eĉ decidis ne veturi al Belgio. Li tamen ŝanĝis sian decidon, sed diris samtempe, ke li ne antaŭvidis paroli pri speciala temo. Li do ripetis la bone konatajn aferojn, kiel ke ĉiu esperantisto estas tute libera kaj povas agi laŭ sia plaĉo, ke la institucioj, kiuj estis kreitaj

ĉesas havi la karakteron de privataĵo. Zamenhof sole deziris, ke la esperantistoj solvu „ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta Esperantistaro.“

Al la antverpena kongreso aliĝis 1800 personoj, rekordo ĝis nun.

Krakovo 1912: ADIAUO

Oka Kongreso Esperantista: Krakovo 1912 (11a ĝis 18a de aŭgusto 1912)

Okaze de la 25a datreveno de la publiko de Esperanto, Zamenhof nostalgie rememoris la malfacilan komencon de sia kuraĝa projekto: „Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvarjara vivo! ..

Kaj memfiere li diris:

„Ni povas pri tio sincere nin gratuli“

Kaj li iom perplekse konstatis:

„Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas kaj tamen, dank' al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua.“

Kaj li trankvile konkludis:

„Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, - tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.“

Finfine, LLZ direktis sin kun jena peto al la publiko:

„Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokratis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron“, ke vi ĉesu honori min per tio titolo.“

LLZ, ne ŝatis titolojn, oficiala posteno ĝenis lin ĉiel, kiel Privat notis. Tiel LLZ emfazis, ke de la komenco li ne volis esti mastro de Esperanto.

Kaj kun elkora danko kaj anonco, ke ĉi tiu krakova kongreso estas la lasta, en kiu oni vidas lin antaŭ la publiko, LLZ adiaŭis de la esperantistoj jene:

„Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.“

Ekde nun, LLZ deziris esti ne *antaŭ* la publiko, sed *inter* ĝi, kaj li petegis la esperantistojn, ke ili ne plu nomu lin „majstro“.

Kaj li donis al la esperantistoj la konsilon labori ĉiam „en plena unueco, en ordo kaj konkordo!“ „Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava!..

„Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi.

Multon LLZ volintus ankoraŭ diri, „ĉar mia koro estis plena“. Kaj tial kun iom malbona konscienco li finis sian paroladon per la frazoj:

„Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: „ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno“, en la grava tago de la jubileo de Esperantismo, li nenion pli havis por diri al ni?

„Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron! – estis la lastaj publikaj vortoj de LLZ. Multaj el la 1000 aliĝintaj e-istoj vidis Zamenhofon por la lasta fojo.

Ŝajnas, ke LLZ estis malkontenta pri la jubilea festeco mem de la krakova kongreso. En letero al Sebert li iom plende demandis en decembro 1912: „Ĉu en Krakovo oni sentis multe la jubilecon? Ne.“

En la berna kongreso de 1913, kiu tamen okazis, kun oficiale 1200 partoprenantoj, LLZ jam ne plu elpaŝis publike, anstataŭe la oficialan kongresparoladon faris la eminenta svisa samideano René de Saussure. Fakte, ankaŭ pri Berno LLZ havis dubojn. Al Sebert li skribis en decembro 1912: „Mi iom timas, ke aranĝi tro rapidigite kongreson en Berno, ki ni havas influajn kontraŭulojn (IDISTOJ), estus eble afero tro danĝera, tiom pli, ke la iom lacaj kaj malagrable surpirzitaj e-istoj eble ne venos en sufiĉa nombro...“Konsiderante la malportunajn cirkonstancojn, en kiuj devos esti organizata la kongreso, ĉu vi ne trovas, ke eble estus pli bone, se ni en tiu ĉi jaro tute ne kongresus? Ĉu ne estus pli bone fari ripozon kaj kolekti pli grandajn fortojn kaj pli grandan entuziasmon por la pariza kongreso?“

Pro la militeksplodo en 1914, la pariza kongreso, al kiu aliĝis pli ol 3700 homoj, ne okazis kiel planite respektive estis malokazigita).

La unua mondmilito enkondukis novan buĉorgion de la gentoj, kaj LLZ mortis la 14an de aprilo 1917, 57a jara en Varsovio.

PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kajfonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nun kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,

Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj.
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!